



# SALUTON!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

16 Julio 2005

N<sup>o</sup> 10

Redaktoro: Araneo

**Adreso (provizora):**  
**Esperanto Societo de Ŝikago**  
**p/a Viktor Pajuk**  
**8228 O'Connor Dr., # 2F**  
**River Grove, IL 60171**  
**(773) 344-2276**  
**FAX: (708) 456-2750**

**Estraro:**

Prezidanto – Roberto Stalzer  
Vicprezidanto – Karlo Offutt  
Sekretario – Viktoro Pajuk  
Kasisto – Karlo Gunn

**Membrokotizoj:**

Membro-subtenanto \$40/jare;  
Familio \$30; Regula \$20;  
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of our Society.  
Check should be payable to:  
**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our  
**Treasurer, Charles Gunn,**  
**828 S. Ada, Chicago IL 60607**

**Kunvenoj:**

Membroj de la Ĉikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Avenue, Ĉikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

**Bonvenon!**

Saluton, estimata leganto! Restis nur unu semajno al la plej grava ĉi-jara evento – UK en la litova ĉefurbo Vilno. Vizitontoj senpacience atendas renkonton kun malnovaj amikoj kaj esperas pri freŝaj kontaktoj. Kaj mi komencos de la raporto pri la lasta societa kunveno

## LASTE OKAZIS

Tiun grandan kvanton de la gastoj en nia klubejo mi apenaŭ memoras. Dekomence estis anoncita vizito de sufiĉe fama paro en Esperantio – gesinjoroj Grattapaglia, Giuseppe kaj Ursula. Kiel konstatis s-ino Ursula, ili estas viktimoj de Esperanto, konatiĝis en Esperantio italo kun germanino kaj kreis internacian familion. S-ro Giuseppe, laborinte por FIAT, reklamis aŭtomobilojn de tiu firmao pere de IL. Poste ili lasis prosperan vivon en Italio kaj ekagis kiel volontuloj por E-bieno-organizaĵo “La espero” en Brazilio, kie ili loĝas ĝis nun. Ankaŭ gesinjoroj Grattapaglia estas membroj de *Rotario Internacia*. La lasta kunsido de nia E-societo koincidis kun festado de la unua 100-jariĝo de tiu renoma bonfara organizaĵo en apuda urbeto Evanstono. Kiel fervoraj E-istoj niaj gastoj venigis al ni ankaŭ aliajn samideanojn-rotarianojn, inter kiu estis usonano Ronald Glossop, belga germano Michael Cwik kaj aliaj. S-ro Cwik, ekonomisto aganta por EU en Bruselo dum multaj jaroj, ĉi-jare lanĉis interesan E-propagandan programon inter rotarianoj – Lingva Ambasadoro. Interesantoj bonvolu kontakti s-ron Cwik rete: [Michael@Cwik-online.net](mailto:Michael@Cwik-online.net). Dank'al abundo da gastoj kaj informo kunsida tempo rapide elvaporiĝis, bedaŭrinde!

## VILNO: neforgesebla harmonio kaj ĉarmo

Por vizitontoj (kaj ne nur) de la sekvanta UK ni volas skize konatigi vin kun la ĉi-jara ĉefurbo de Esperantio.



Akorde kun kalkuloj, faritaj en 1990 de Nacia Geografia Instituto de Francio, Vilno situas nur 25 km for de Eŭropa vera centro. Kun loĝantaro de pli ol duonmiliono da personoj, la urbo faras impreson de kompakta kaj komforta urbo, sed samtempe ĝi ne povas esti konsiderita kiel tipa malgranda urbo. Vilno fariĝis hejmo ne nur de litovoj – parolantoj de la plej malnova hindo-eŭropa lingvo, sed ankaŭ de multaj rusoj, poloj, judoj, revenintoj el Okcidenta Eŭropo kaj Usono. Eble, tiu

## UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –

Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;  
toll free: 1-800-ESPERANTO  
(1-800-377-3726)  
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association  
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet  
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/esp/viva/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation  
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo  
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format  
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:  
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

## Sekvantaj kunsidoj:

**27an de Julio** – okazos distanca kunsido en Vilno, Litovio. La loko jam estis rezervita en la Kogresejo! En Ŝikago prezidos Karlo Offutt

**24an de Augusto** – membroj de la societo raportos pri sia freŝa sperto en **Esperantio-05**

**28an de Septembro** – gvidos d-ro Puramo Chong, temo estos anoncata

Ĉu ankaŭ ĉi jare ni festos **Ago-Tagon** kune kaj pasigos du oktobrajn tagojn en E-etosoj dum la **Kolumba tago?** (reeĥu)

ĉi unika kombino de siaspeca kosmopolita vivo kaj loka pensmaniero ĉiujare altiras pli kaj pli da turistoj kaj entreprenistoj.

Oni diras, ke la loĝejo ekzistis jam en la 7a jarcento antaŭ Kristo, tamen nomo de la urbo en manuskriptoj aperis nur en la 14a jarcento, dum la epoko de granda duko Gediminas. Li invitis negocistojn, metiistojn, ekleziulojn el Eŭropo, pro tio ĝis nun la urbo estas nomata *Norda Jerusalemo*. Abundas ne nur historiaj monumentoj, Vilno estas ankaŭ urbo de kulturo, natura beleco kaj Esperanto. Tie ĉi funkcias E-klubo, tie ĉi loĝas E-poetoj, verkistoj, tradukistoj. Nun mi proponas al la legantaro fragmenton de poemo *Nia civilizacio* de Inita Tamoŝiuniene:

Mi vivas sur Tero. Mi moortos sur Tero.  
Kaj tamen forestas la kaŭz' por fiero,  
Eĉ male – hontegas sen lim' koro mia  
Pro tia homar' kaj civilizacio.  
Sendube, en multaj Ter-generacioj  
Estadis saĝuloj, eĉ iam – genioj,  
Sed vivo sen senc' de l' restintaj amasoj  
Nur estas kreado de la embarasoj.  
Dum sia mallonga surtera ekzisto –  
Al artefaritaj obstakloj rezisto –  
La homoj kverelas, la homoj skandalas,  
Faligas aliajn kaj ankaŭ mem falas,  
La homoj per bomboj, pafiloj, eĉ vortoj  
La homojn aliajn mortigas perforte  
Kaj Teron difektas sen ĉes' diligente,  
Kaj pretas eĉ ĝin eksplodigi momente  
Kaj ofte, tre often e povas reale  
En lingvo la sama paroli normale...


\* \* \*



Entute jam aliĝis pli ol 2200 gesamideanoj el 62 landoj, inter ili – kvin membroj de nia societo: prezidanto Roberto Stalzer, d-ro Leszek Kordylewski, eksa vilnano Walter Cebulski, reprezentanto de fama E-familio de Dobrzynski – Jerzy kaj nia sekretario Viktor Pajuk, kiu jam kontaktis kun esperantistoj el ĝemelurboj de Ŝikago (entute 24 urboj en 23 landoj). Estis senditaj mesaĝoj al e-istoj de 16 urboj, reeĥis 9, el kiuj nur 4 estos reprezentotaj en Vilno, pretaj preparoli ĉe ronda tablo perspektivoj de nia estonta kunlaboro.

Al partoprenontoj de la UK oni proponas ne nur riĉan kongresan programon, sed ankaŭ antaŭ- kaj post-kongresajn, unutagajn kaj duontagajn ekskursojn tra Vilno, Litovio, Latvio kaj Estonio, vi havas eblecon vizi-ti 750-jaran Kaliningradon kaj pli junan Sankt-Peterburgon. Do, kiu ankoraŭ hezitas, eku al la UK en Vilno por festi centjariĝon de la unua E-kongreso!

Pri ĉuj menciitaj eventoj nepre informos vin sur la paĝoj de *Saluton!* ĝia redaktoro kaj via obeema servanto

 araneoesp @ yahoo.co.uk